

N-ro 1

Julio

1912

★ ESPERANTISTA ★  
GAZETO  
**DANLANDO**




Sub redakcio  
de  
**ANDR. NISSEN**



**Eldonejo Esperantista  
KOPENHAGO**

703.742-B. Esp-  
1912-1913





## Al la danaj Samideanoj!

**P**ER la nova gazeto *Danlando* mi kun granda ĝojo ree salutas miajn legantojn; mi tion faras kun la espero pri bona samlaboro, fruktoportanta por nia movado. Samtempe mi dankas miajn samideanojn pro la afableco kaj rapideco, per kiu ili faciligis al mi la taskon, kiun mi prenis sur min, la starigon de la ligilo inter ni. la gazeto, kies malapero ĉiuj bedaŭre sentis.

Mi precipe dankas la prezidantojn de la kluboj, kiuj afable helpis min kolektante abonantojn. Estas riskanta afero eldoni gazeton, sed mi kuraĝas esperi, ke la samideanoj nun komprenas la gravecon de la rolo, kiun ludas gazeto en nia luta movado, tiel ke ili ĉiuj laŭpove klopodu varbi abonantojn.

Estos mia celo igi la gazeton tiel interesa kaj riĉenhava kiel eble. La legantoj ĉiam rapide sciigos pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj en nia propra lando kaj en eksterlando.

Mi petas miajn samideanojn ĉiam sendi al la redakcio mallongan raporton pri signifaj novaĵoj kaj progresoj de siaj grupoj.

En ĉi-tiu numero komenciĝas serio de priskriboj de danaj urboj, en kiuj troviĝas Esperanto-societoj, kaj mi petas la samideanojn en la diversaj urboj, ke ili en sufiĉe bona tempo preparu priskribon de siaj urboj.

Por esti tiel utila al la legantoj kiel eble la redakcio promesas respondi laŭpove en la gazeto al ĉiuj demandoj.

Kun la espero ke la gazeto *Danlando* fariĝu bona apogilo por la movado en nia lando mi turnas min al

### Niaj eksterlandaj Samideanoj

kun la peto, ke ankaŭ ili apogu nin en nia laboro por disvastigi nian belan lingvon. Mi rekomendas la gazeton *Danlando* al la multaj esperantistoj, kiuj jam vizitis nian landon kaj esperas, ke ĝi estu por ili reciproka amika ligilo inter ili kaj ni.

Fine mi atentigas miajn legantojn pri la adreso de la redakcio kaj administracio, ĝi estas nur

Strandgade 11,  
Kopenhago.

*Andr. Nissen.*

## La IV<sup>a</sup> Dana Jarkunveno.

Dum la pentekosto okazis en Vejle la IV<sup>a</sup> jarkunveno de C. D. E. L. Ĉi-tiun jaron ni havis la ĝojon, ke inter la 70 partoprenantoj troviĝis ankaŭ samideanoj de Flensburg, Hamburg, Kiel kaj Kristiania. Kvankam la vetero ne estis bona, regis la plej bona esperantista humoro dum ĉiuj ekskursoj en la bela ĉirkaŭaĵo de Vejle, kaj la programo estis senkvata de punkto al punkto.

La unuan tagon oni ekskursis al Munkebjerg kaj Grejsdalen. Inter ambaŭ ekskursoj okazis la ekstraordinara ĝenerala kunveno de Centra (vidu malsupre).



Dum la vespero „Vejle Esperantista Klubo“ akceptis la gastojn en sia klubejo, kie *Fino Agnes Melchior* kaj la pianisto *Sro Georg Jespersen* ĝojigis la gastojn per ĉarma kantado kaj muzikado, kaj *Sro Egly* surprizigis per laŭtleĝado de memfarita traduko de la fama poemo *Terje Vigen* de *Henrik Ibsen*. Plej grandan admiron atingis certe okjara knabino, la plej juna filino de gesinjoroj *Senff* el Hamburgo. Kun granda lerteco ŝi, starante sur seĝo, deklamis longan poeman saluton al la danaj samideanoj, verkitan de ŝia patro.

Bedaŭrinde ni dum la jarkunveno mankis kaj nian honoran prezidanton kaj nian prezidanton. La unua, *Sro Packness*, pro mal-

sano, terure suferanta, estis devigata resti en la lito, kaj la dua, Sro *Nissen*, survoje al Vejle falis kaj kotuzis sin tiel, ke kuracisto, kiu feliĉe ĉeestis kaj helpis lin, resendis lin al Kopenhago. Anstataŭ Sro *Nissen*, Sro *Ad. B. Hansen* funkciis kiel prezidanto kaj bone plenumis sian taskon.

La duan tagon okazis ekskurso al la vilaĝo *Jellinge* en terura pluvego. Nur unu momenton la pluvo ĉesis por ke la esperantistoj estu fotografataj.

Kiel oni vidas, ili staras ĉe la piedo de l' tombo de reĝo *Gorm la maljuna*. Ĝus antaŭ la fotografado la nelacigebla kapitano *Aae* el Horsens, kiu ne povas toleri vidi flagstangon sen Esperanto-flago, suprenlevigis la verdan standardon sur la flagstangon, kiu staras sur la pinto de la reĝa tombo, certe la plej historia loko, kie ĝis nun la kapitano plantis la verdan standardon.

Post malgranda ekskurso al *Skyttheuset*, okazis je la reveno al Vejle kunsido de l' membroj de U. E. A.

Je la 5<sup>a</sup> h. ĉiuj kongresanoj kolektiĝis en hotelo *Grand* ĉe festmanĝado. Kiel reprezentanto de Sro *Packnes* ĉeestis lia nevo Sro *Adjunkto Alsted*. Sro *Ad. B. Hansen* prezidis ĉe la tablo kaj laŭtleĝis la multajn alvenintajn telegramojn i. a. unu de nia nova reĝo, Chr. X., al kiu estis sendita telegrafan saluton je la antaŭa tago. Parolado sekvis paroladon kaj la plej gaja humoro regis de la komenco ĝis la fino. Sro *Dro Mejndor* (Aarhus) i. a. invitis „Centra“ al Aarhus la venontan jaron kaj promesis, se la jarkunveno okazos tie, doni 100 Kr. al la kongresa kaso. (Aplaŭdego). La ĉeestantaj gazetistoj ankaŭ fine deklaris sin tute venkitaj; unu el ili eĉ diris, ke li alvenis iom skeptika, sed de nun lia gazeto plene malfermas siajn kolonojn por la esperantistoj.

Vespere okazis propaganda kunveno en la urbodomo, kies festsalono la urbestro afable metis je la dispono de la esperantistoj. Sro *Ad. B. Hansen* malfermis la kunvenon kaj donis la vorton al Sro *Kapitano Aae*, kiu interese parolis pri nia lingvo kaj pri siaj privataj spertoj rilate al la bezono de lingvo internacia. La vivplena parolado estis forte aplaŭdata de la ĉeestantaro. Poste Sro *Frédéric Baruël* tre amuze laŭtleĝis „La princino sur la pizo“ de H. C. Andersen.

Kun kuntima lerteco kaj eleganteco Sro *Georg Jespersen* prezentis diversajn muzikaĵojn kaj *Fino Agnes Melchior* ravigis la aŭskultantojn per sia ĉarma voĉo. La esperantan himnon kaj la danan nacian kanton fine estis kantata de ĉiuj esperantistoj.

## DANLANDO

Post adiaŭa glaso en hotelo „Grand“ oni disiĝis kun kora „ĝis la revido en Aarhus la venontan jaron“.

Dum la jarkunveno estis aranĝita en hotelo „Grand“ tre riĉhava ekspozicio.

Fino *Rasmussen* kaj *Sro Egly*, kiuj estis la ĉefaj aranĝantoj de la jarkunveno, meritas dankon pro la bone aranĝita programo, same meritas ankaŭ iliaj du nelacigeblaj helpantoj, Fino *Erika Olesen* kaj *Sro Rasmussen* el Vejle.

*Partoprenanto.*

## Internacia Fianĉiĝo.



Estas preskaŭ superflue rakonti al la tuta mondo, ke la Komerca Ĉambro en Los Anĝeles elsendis *Sron Parrish* por fari propagandon por la bela Kalefornio; krom ĉiuj Esperanto-gazetoj ankaŭ la duon-parto de la eŭropaj gazetoj jam rakontis pri tio. La ĉefa celo de ĉi-tiu vojaĝo estas kompreneble instigi la eŭropanojn al elmigrado al la kvazaŭ paradizlando

*Sro P.*, kiu estas juna kaj energia viro, bone plenumas sian taskon; pli ol unu juna kaj energia viro certe

tuj decidis vojaĝi tien kaj tiakaŭze tuj komencis studi Esperanton; *Sro P.*, kiu kompreneble ĉiam faras siajn paroladojn en Esperanto, ja rakontas, ke ĉe unu el la universitatoj en Los Anĝeles oni instruis Esp. dum la 2 lastaj jaroj, kaj ke la komerca ĉambro ankaŭ uzas Esp. k. t. p., tial junaj energiaj viroj ne kuraĝas vojaĝi Kalefornion sen Esperanto.

La Komerca Ĉambro certe ne povis trovi pli taŭgan kaj ageman propagandiston ol Sro P., li mem eĉ tre laŭlitere plenumas sian taskon kaj kondukas kun si al Kalefornio unu eŭropanon, nome nian samlandanon, Finon *Paula Grave*, kun kiu li fianĉiĝis. Ke Fino G. iros al tiel mirinda lando kun tiel fama esperantisto iom konsolas nin en la dolora penso, ke unu el niaj plej fervoraj kaj gajaj esperantistinoj devas forlasi nin.

Ni kore gratulas la junajn gefianĉojn, samtempe kiam ni dankas Sron P. pro la bonega propagando, kiun li per siaj paroladoj faris en nia lando.

Ni kun plezuro akceptos ĉiujn eksterlandajn propagandistojn, sed ni ensiste petas ilin: ne forrabu niajn bonajn esperantistojn!

## K l o d e n   r u n d t

**Berlin.** „Deutsche Lehrer-Versammlung“ holdt i Pinsen Møde i Berlin. Et særligt Møde holdtes af Esperanto-Lærere. Interessante Taler holdtes bl. a. af Lærer *Sykora*, Dresden, der underviser i Esperanto i 30te Kommuneskole, Lærer *Tietsch*, der det sidste halve Aar har undervist Kommuneskoleelever i Esperanto i Byen Schöneberg og Lærer *Henker* fra Döhlen, der sammen med en Kollega ved den derværende Kommuneskole underviser i Esperanto, der er optaget som Fag paa Timeplanen. Ved Paaske afholdtes Eksamen i Esperanto sammen med de andre Fag. Talerne vakte stor Opsigt, og der blev indsendt officiel Raport til „Deutscher Lehrerverein“.

**Bad Reichenhall.** Esperantister fra forskellige Lande har besluttet at tage Ophold her i Somren 1912 for at danne en virkelig international Koloni, der kun betjener sig af Esperanto. »Kurverein« udsender gratis illustreret Fører over det henrivende Badested.

**Bonn.** Den Georgiske Handelsskole afholder Kursus i Esperanto.

**Dresden.** Det Sachsiske Esperanto Institut har med Indenrigsministeriets Tilladelse oprettet et Museum og et Bibliotek,

## DANLANDO

der nu er offentlige Statsinstitutioner. — Da mange Firmaer nu søger Medhjælpere, der taler og korresponderer Esperanto, har Institutet oprettet Engagerings-Bureau.

**Gross-Schönaü.** Skoleinspektøren har givet Tilladelse til, at der undervises Esperanto i de to ældste Klasser. 61 Børn bliver allerede undervist.

**Krakow.** Kongres Komitèen har modtaget fra Borgerrepræsentationen 5000 Kr. (østrisk), fra Ministeriet for offentlige Arbejder 1000 Kr., fra Handelssyndikatet 200 Kr.; sidstnævnte er den ældste Korporation i Krakow, idet den er stiftet i 1406. Selv om den skænkede Sum ikke er saa stor, er den dog meget kærkommen, da den er et Bevis paa, at Handelsstanden viser Esperanto Interesse. Handelskamret og Turistforeningen har ogsaa lovet financier Støtte.

**Breslau.** I Anledning af Hundredaarsdagen for Krigen 1813 arrangerer Byens Magistrat en stor kulturhistorisk Udstilling. Lande, der deltog i Slagene dengang, indbydes til at deltage deri ved at sende Udstillingen Materiale. For at skaffe saa meget som muligt tilveje, ogsaa fra private Personer, bruger Byen Esperanto, idet den har sluttet sig til U. E. A., der udsender Byens paa Esperanto affattede Cirkulærer. Ligeledes udlaaner man Lysbilleder til Brug ved Esperanto-Foredrag i Udlandet. en Fører paa Esperanto vil snart udkomme.

„Nord Amerika Esperanto Asocio“ har ladet trykke en Million Flyveskrifter „Et Overblik over Esperanto“ og bekendtgjort i alle amerikanske Dagblade, at enhver, der indsender Navn og Adresse samt vedlægger et Frimærke, faar gratis tilsendt et Eksemplar.

Følgende berømte franske Flyvere er ivrige Esperantister: Farman, Marineløjtnant Conneau, Vidart, Gilbert, Kimmerling, Train, Deperdussin.


Det østrigske Trafikministerium har atter udsendt en elegant ill. Fører, denne Gang over de østrigske Alper. Forsøget med den forrige Aar udsendte Fører, maa altsaa være faldet heldigt ud, ellers havde Ministeriet vel ikke gentaget Forsøget.



## Interesa Sportprezentado.

Piedirado ĉirkaŭ la insulo Selando.

Sur la bildo ni vidas du tre interesajn personojn, la amerikan Sinon *Harry Humphries*, kiu sur sia piedirado ĉirkaŭ la mondo ĵus alvenis al Kopenhago, kaj nian samlandanon Sron *S. M. Breckwoldt*, la konatan vegetaranon, plej bone li estas konata sub la nomo „la Banano“. La energia sinjorino, kiu loĝas en New York forlasis sian hejmon en Julio pasintan jaron por meti rekordon



por virinoj en piedirado kaj gajni per tio premion de 10,000 dl. (37,500 Kr.), kiun la sporta gazeto »*Polo Monthly*« promesis al si, se ŝi povos ĉirkaŭiri la mondon kaj esti en New York en Julio 1915.

Ŝe jam marŝis 7000 anglajn mejlojn kaj trairis Usonon, Kanadon, Grandan Britujon, Norvegujon antaŭ ol ŝi venis al Danujo. Tre rapide ŝi iras, ekz. en Norvegujo ŝi iris de Kristianssand al Kristiania (348 angl. mjl.) kaj uzis nur 7 tagojn, vere treege bone sporta prezentado precipe de virino. En Kristi-

## DANLANDO

ania la norvega reĝo, *Haakon la VII*, afable akceptis ŝin en aŭdienco kaj kun intereso aŭdis pri ŝia longa promenado.

En Norvegujo Sino Humphries aŭdis pri nia samlandano „la Banano“ kaj sendis al li inviton por vetirado ĉirkaŭ Selando. La Banano, kiu estas tre bona sportano, opiniis, ke li facile povos gajni en tia irado, sed ĉar li ne volas venki virinon, li proponis sekvi ŝin ne por venki, sed por montri, ke li tion povas, eĉ se la kondiĉoj ne estos egalaj por ili. Li nome volas tiri sian „rikŝavon“, kaj ĉar li ne parolas la anglan lingvon, kaj la sinjorino ne la danan, li eĉ proponis kunpreni en la veturilo interpretiston, por tiu ofico juna islandano sekvas ilin. Kiel oni vidas, malgrandan internacian societeton, ili nur mankas la internacian lingvon. Komprenoble la du piedirantoj multe bedaŭras, ke ili ne ankoraŭ parolas Esperanton. Sro Breckwoldt, kiu jam estas ano de unu el niaj Esp.-societoj, ne ankoraŭ havis tempon por lerni la lingvon, sed li estas bona defendanto de Esperanto kaj jam skribis artikolojn en bontemplana gazeto kontraŭ tiuj, kiuj malhelpas la ideon per senĉesaj reformoj.

Sino Humphries, kiu ĝis nun nur vojaĝis en angle-parolantaj landoj, komencis jam je sia alveno al Norvegujo senti la mankon de komuna lingvo, tial estis facila afero por mi varbi ŝin por Esperanto; mi okaze havis anglan ŝlosilon en la poŝo kaj donis ĝin al ŝi, kiu tuj komencis studi ĝin. La venontan tagon mi trovis por ŝi malgrandan anglan lernolibron; ŝi nun havas ĝin en sia saketo kaj promesis survoje studi diligente. Mi ankaŭ rakontis al ŝi pri la interna ideo de la esperantismo kaj pri la samideaneco kaj helpemeco de la esperantistoj, kaj mi petis ŝin serĉi la esperantistojn en ĉiuj urboj, kien ŝi venos. Mi tial petas ĉiujn samideanojn, kiuj renkontos ŝin, montri al ŝi, ke mi parolis la veron dirante tiel.

Ankoraŭ ŝi komprenoble ne povas esprimi sin en Esperanto, sed en ĉiu urbo ŝi povas lerni iomete, kaj se inter la esperantistoj troviĝas angle-parolantaj personoj, kiuj volas helpi ŝin en la komenco, ili ankaŭ tiamaniere povas montri samideanecon al ŝi, ekz. estus al ŝi granda helpo, se oni antaŭe preparus la esperantistojn en tiu urbo, al kiu ŝi venos, tiel ke ili trovu personon, kiu parolas anglan lingvon, kaj kiu povas akcepti ŝin kaj doni al ŝi sciigojn pri hoteloj, gazetoj k. t. p.

Ŝi estas kuraĝa, aminda virino, kiu gajnas la amikecon de ĉiuj, kiuj konatiĝas kun ŝi. Ŝi povas fariĝi bona propagandisto por nia afero.

La nomo de Sro *Breckwoldt* estas tre konata en Danujo, tamen la plej multo nur scias, ke li estas konata vegetarano kaj sportano, liaj personaj spertoj rilate al vegetarismo kaj la novaj ideoj, kun kiuj li venas, meritas esti pli multe konataj kaj en Danujo kaj en eksterlando, tial mi intencas preparoli lin alian fojon en speciala artikolo.

(Daŭrigota).

*Margrethe Noll.*

## Nia Lando

Centras ekstraordinære Generalforsamling afholdtes i Vejle (Hotel Grand) d. 26 Maj 1912.

Af Repræsentantskabet var mødt: Hr. *Ad. B. Hansen*, Fru *Lindow* og Frk. *Rasmussen* (København), Frk. *M. Knudsen* (Odense) og Hr. *Egty* (Vejle). Som Delegerede mødte Hr. cand. jur. *F. Baruël*, Frk. *Margrethe Noll* og Frk. *Anna Jørgensen* (Esperantistforeningen, København). Frk. *A. Melchior*, Frk. *H. Borgmann* og Frk. *Hübner* (Konversacia Esp.-Klubo, København). Hr. Kaptajn *Svend Aae* (Horsens), Hr. *J. Jørgensen* (Unueco, Odense), Hr. *L. Boch* (Esbjerg), Frk. *E. Olesen* (Vejle, 2 Stemmer), Hr. cand. phil. *Chr. Heilskov* (Aarhus), Frk. *M. Knudsen* (Odense Esperantoforening).

I Hr. Nissens Fraværelse ledede Hr. Ad. B. Hansen Forhandlingerne. Hr. Kaptajn Aae dirigerede.

Da Klubberne jo allerede gennem Centras Sekretær har modtaget Referat af Generalforsamlingen, skal her kun meddeles, at der vedtoges:

„at Centras Repræsentantskab maa anses for at være stemmeberettiget paa Generalforsamlingen i alle Spørgsmaal vedrørende Sager, men ikke ved Valg af Repræsentantskabs-Medlemmer“.  
(Punkt I).

Punkt II blev henlagt til næste Generalforsamling.

Punkt III. Centra udtalte det Ønske, at den internationale Organisation maa blive dannet saaledes, at den bliver et Udtryk for Flertallets Ønsker.

Punkt IV. Det vedtoges at bruge Esperanto som Centras Skriftsprog, derimod tales dansk paa Generalforsamlingen.

## DANLANDO

Punkt V. Horsens Klub trak sit Blad-Forslag tilbage, da der forelaa Tilbud fra Hr. Nissen om at starte et nyt Blad.

(Af Protokollen)

**Esperanto Unuiĝo de Danaj Instruistoj** aranĝis kunvenon por geinstruistoj en Fredericia la 25<sup>an</sup> de Majo. En la salonego de „Hotel Victoria“ estis aranĝita ekspozicio de libroj, gazetoj, bildoj, afiĉoj k. t. p. Ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis la posttagmezan kunvenon, inter ili multaj el la membroj de l' unuiĝo eĉ de malproksimaj urboj, ankaŭ germanaj gekolegoj survoje al la jarkunveno en Vejle vizitis Fredericia por ĉeesti la kunvenon.

La prezidanto *Fino Asta Mikkelsen* malfermis la kunvenon kun parolado pri la celo de la unuiĝo kaj pri ĝia laboro dum la pasinta duonjaro, kun granda ĝojo ŝi sciigis, ke la membraro pli ol duobliĝis de post la fondiĝo de l' unuiĝo en Novembro 1911.

Poste la sekretario *Fino Margrethe Noll* klarigis al la ĉeestantoj la ekspozicion kaj parolis pri Esp.-literaturo. Ŝi atentigis la membrojn pri la legrondoj, kiujn la unuiĝo intencas starigi; ĉar la unuiĝo ne ankoraŭ posedas multajn librojn, la prezidanto kaj la sekretario melis siajn proprajn bibliotekojn je la dispono de la membroj. La parolanto petis la membrojn precipe studi tiun literaturon, kiu rilatos la Esp. movadon kaj la kontraŭmovadon, ŝi mem tion faris kaj tiamaniere forte konvinkiĝis pri la ekzistrajto de Esperanto.

Post la parolado okazis diskutado pri „Esperanto kaj la lernejo“. Sro *Zoffmann* el Kolding parolis pri sia sperto rilate al Esp.-instruado al infanoj, kaj Sro cand. theol. *Madsen* el Fredericia rakontis, ke li ricevis permeson instrui Esp. in la reallernejo post la somera libertempo.

La prezidanto de la idista asocio, Dro phil. Forchhammer, kiu honorigis la kunvenon per sia ĉeesto, tiam petis la parolon. Li komencis kun komplimento al la unuiĝo pro la granda laboro farita de ĝi kaj pro ĝia ekspozicio kaj transiris poste al protesto kontraŭ la enkonduko de Esp. en lernejojn, kiam ekzistas pli bona lingvo, nome Ido. Sekvis nun longa defendo por Ido laŭ la ĉiama recepto, kaj por montri ĝian belsonecon, logikecon kaj superecon de Esperanto, Dro F. disdoni skribaĵojn kun kompara teksto en la plej terura Esperanto, malbona dana lingvo kaj Ido.

Tiaj skribaĵoj certe ne faras la efikon celitan, ĉar personoj, kiuj ne konas la lingvojn, ne komprenas la genian metodon, en

kiu ili estas skribitaj, kaj la esperantistoj nur miras pro tiu, ke la ĉefaj idistoj volas uzi tiajn batalilojn.

Du germanoj Sroj *Senff* kaj *Schöne* kontraŭparolis lin, la unua en germana lingvo la alia en Esperanto. Sro *Schöne* kun efiko rakontis pri la granda malsukceso de Sro *Peus*, kiu en Hamburgo provis pruvi la superecon de Ido. Sro *P.*, germana parlamentano, estas unu el la ĉefaj idistoj!

Kiel onis vidas, la diskutado iom post iom malproksimiĝis de la vera temo, „Esp. kaj la lernejo“, kaj tial la direktanto Sro *Rektoro Kock* submetis sian mandaton, kaj ĉar oni jam preterpasis la la templimon por la kunveno, la prezidanto estis devigata fini la kunvenon, ŝi tion faris kun la bedaŭro, ke oni ne havos sufiĉe da tempo por diskuti pli detale nian temon.

### Provizora Programo de la VIII Kongreso en Krakovo.

La definitiva programo nur povas esti starigota 2 aŭ 3 semajnojn antaŭ la kongreso. Jen la provizora programo:

**Dimanĉon** la 11. Aŭg.: Inaŭguracio de la kongreso. Vespere: Komuna festmanĝado.

**Lundon** la 12.: Kongresaj kunsidoj. Vespere: Jubilea festvespero.

**Mardon** la 13.: Ekskurso al salminejoj en Wieliczka. Vizitado de la kongresurbo. Vespere: Lumbildaj paroladoj.

**Merkredon** la 14.: Kongresaj kunsidoj. Vespere: Teatraj prezentadoj; por unu parto de la kongresanoj en la urba teatro la tragedio »*Marzepo*«; por alia parto en la „Teatro de Novajoj“ la burlesko „Ĉio en ordo“, kabareto k. a.

**Ĵaŭdon** la 15.: Diservoj kun esperantaj predikoj en katolika kaj protestanta preĝejoj. Manovroj de la Ruĝa Kruco. Disdono de premioj de la *Literatura Konkurso*. Vespere: Balo.

**Vendredon** la 16.: Kongresaj kunsidoj. Vespere: Teatraj prezentadoj (vidu merkrede). Ambaŭ partoj de la kongresanoj ŝanĝos la teatrojn.

**Sabaton** la 17.: Finferma kunsido de la kongreso. Vespere: Koncerto.

**Dimanĉon** la 18.: Festa parado de la krakova garnizono okaze de la 82<sup>a</sup> datreveno de l' naskiĝo de imperiestro Francisko Jozefo I.

## Odense.


## Ĉefurbo de l' insulo Fyen (Fiono).

Vojaĝanto, kiu venas al la urbo Odense, ricevos belan impreson de la granda parko, kiu nomiĝas „Reĝa ĝardeno“, kaj kiu ĉirkaŭas la iaman monaĥejon de la Sankta Johano. En pli malfrua tempo la monaĥejo fariĝis reĝa kastelo kaj ĉi-tiun nomon portas ankoraŭ la simpla konstruaĵo.

Kvankam Odense faras al la vizitanto tute modernan impreson, ĝia nomo havas antikvan sonon, kaj la urba historio estas skribinda, ĉar interesaj kaj karaj memoraĵoj sin ligas al ĝiaj domoj kaj stratoj.

La mito rakontas al ni kiel antikva prapatro starigis sian domon ĉi-tie, meze de la fruktodona insulo Fiono. Ankaŭ la fama heroo Palnatoko iam estis superestro de l'insulo.

Inter fremduloj la urbo nun estas plej bone konata kiel naskiĝurbo de la fabela verkisto *H. C. Andersen*. En dankema




Naskiĝdometo de H. C. Andersen.

memoro pri la mondfama verkisto la urbestro akiris la dometon, en kiu li naskiĝis. Tie estas kolektataj multaj memoraĵoj pri la verkisto, ekzemple lia ĉapelo, okulvitroj, plumingo, multaj leteroj skribitaj de li mem, bildoj, libroj k. t. p. entute interesege muzeo.

Bonsimila monumento de H. C. Andersen troviĝas ĉe la vojo de la stacidomo al la koro de

l'urbo. Meze de la urbo la bela *Urbodomo* altiras la rigardon kaj tre proksime staras la granda preĝejo, konstruita je la gloro de la reĝa martiro *Sankta Knud*, kies nomon ĝi portas; alten sin streĉas ĝia grazia turo. Ŝtona kruco en la pavimo montras la lokon, kie la rego en la jaro 1086 estis mortigata de furiozaj persekutantaj kamparanoj, kiam li preĝante genufleksis antaŭ la altaro en la preĝejo *Sankta Albano*, kiu nun ne plu ekzistas. Rivereto murmurante trafluas la memorriĉan urbon. Somere vaporŝipetoj portas gajajn vizitantojn al la proksima arbaro »*Fruens Bøge*« (la fagaro de la sinjorino). Bela estas vespera akvoveturado tien preter verdaj herbejoj, ornamitaj per blankaj somerloĝejoj kaj bonodorantaj ĝardenoj al silenta, ombra arbaro.



Placo en la urbo.



Malantaŭe: la preĝejo de St. K. — Dekstre: industripalaco.

## DANLANDO

De l' urbo la fervojo portas la gastojn al multaj vizitindaj naturbelaj lokoj, ekzemple al la idilia lago »Langensø« aŭ al la fiŝkaptist-urbeto *Kjertemide*, konata kiel bona marbanejo.

Cetere la urbo Odense mem montras multajn interesajn vidindaĵojn. Riĉa muzeo enhavas artaĵojn, antikvaĵojn krom etnografian kaj zoologian fakon. Ankaŭ vidinda estas la haveno, al kiu eĉ grandaj ŝipoj venas tra la 7 km. longa kanalo, jam farita antaŭ cent jaroj. Ĉiuj fremduloj surpriziĝas pro la neatendita vidaĵo, ĉar neniu kredas, ke nemarborda urbo havas tian vivan interrilaton kun la grandaj maraj vojoj. —

En la stratoj rapidas la tramo kaj la aŭtomobiloj, kaj super ĉio pendas elektraj lanternoj. Ĉiam la urbo sekvis la postulon de la tempo, kaj tial ĝi, juna kaj kreskanta, konservis sian lokon inter la plej grandaj kaj gvidantaj danaj urboj.

Riĉa pri memoroj, moderne rapidanta kaj pace armita por renkonti bonan estontecon nia urbo bonvenigas tiujn, kiuj deziras nian inviton kaj saluton.

*P. Bondesen.*



»Fruens Bøge«.



## La III<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj.

Suprenomita kongreso okazos en Budapesto la 22 aŭ 23 de Aŭg. kaj daŭros 3 tagojn. La komitato sukcesis jam nun zorgi pri preskaŭ senpaga loĝejo por pli ol 100 sinjoroj kaj 50 sinjorinoj. Lia Kardinala kaj Princa Moŝto *Klaudio Vaszary*, primato de Hungarujo kaj Lia Ĉefepiskopa Moŝto *Johano Csernoch* bonvolis akcepti la altan protektadon de la kongreso.

### Literatura Parto

#### Pilgrimado.

De Carit Etlar.

En la norda parto de l' paroĥaro Ribe ne malproksime de Lemvigo estas malnova masivmura biendomo, nomata monaĥejo de Gudom. Oni rakontas, ke ĉi-tiu konstruaĵo antaŭe estas biendomo de nobela familio, nome Resen. La plej lasta posedanto de tiu-ĉi nomo estis maljuna viro, kiu post la morto de sia edzino vivis tie kviete kaj neatentite, okupata pri la edukado de sia filo, la heredanto de lia bieno kaj honoro.

La juna Resen estis proksimume deksesjara, kiam lia patro severe malsaniĝis; la kuracistoj dubis pri lia vivo, oni preĝis por li en la preĝejo, la pastroj legis por li la meson, nenio helpis, li ĉiam plie malsaniĝis. Tiam je vespero la filo iris en la preĝejon, genufleksis ĉe la altaro, preĝis al Dio, ke Li savu la malsanulon, kaj promesis, meze de sia ĉagreno kaj doloro, fari pilgrimadon al la tombo de Kristo, se la patro denove resaniĝu.

De post tiu-ĉi vespero Resen resaniĝis, lia forto revenis, kaj kiam li estis ekster danĝero, la filo pensis pri la plenumo de sia promeso. La maljuna patro tre kontraŭvole donis sian konsenton, li prezentis al la filo la danĝerojn kaj ĝenojn, kiuj estas kunligataj al longa vojaĝo, petis lin prokrasti sian decidon almenaŭ ankoraŭ kelkajn jarojn, promesis akiri por li nuligon de la promeso ĉe la papo, sed ĉio estis vana. La saman tagon, kiam la patro leviĝis

## DANLANDO

de sia malsanejo, la filo forlasis Gudom kaj iris suden post kora adiaŭo al sia patro kaj al ĉiu, kiun li hejme konis. —

La maljuna Resen nun esti sola. Li estis perdinta la lastan, kiu donis signifon al lia vivo, pro tio li senpacience atendis la tempon, kiam ĉi-tiu vojaĝo estos fininta kaj kalkulis por si mem la preskaŭan tempon, kiam li denove revidu sian karan filon. Tiel pasis pli multaj jaroj. Al Gudom neniam venis informon pri la pligrimado de la junulo. La amikoj de la bienposedanto timis, ke ia akcidento okazis al la pilgrimanto. Ĉiuj dubis revidi lin; la sola, kiu ankoraŭ esperas, estas la patro.

Estis vespero en aŭtuno, la maljuna Resen staris sur alta monteto proksime ĉe la maro rigardante la ondojn. Granda hispana ŝipo krozas ekster la marbordo kaj fine ankrumas tie. Boato estas elmetita, kelkaj viroj malsupreniras en ĝin kaj remas al la lando, tie ili albordigas homon kaj reremas al la ŝipo, kiu post iom da tempo denove forveturis. — Sed la viro, kiun ili postlasis sur la marbordo, estis kriplulo. Liaj vestaĵoj estis ĉifonitaj kaj disŝiritaj, lia vizaĝo pala kaj malgrasa. Lia hararo grizigis, kaj tamen ĉi-tiu homo verŝajne ne havas pli ol 25 jarojn. Ĉion ĉi-tiun vidis la maljuna Resen de supre la monteto, li rapi is al la fremdulo ĉirkaŭprenante lin, kaj la patro rekonis en li sian filon. La deziro de la junulo estis plenumita, kiam li tiun vesperon preĝis al la Sinjoro, ke Liprenu lin kiel oferon anstataŭ la malsanulon. Li deziris fordoni sian propran junecon por savi la patron, li konis nenian junecon, de infano li fariĝis maljunulo, kaj nun li portis la morton en sia koro.

„Venu, filo mia“, diris la patro al li, „akompanu min hejmen al la domo, vi estas laca, vi estu flegata kaj resanigota“. Sed la junulo ne povis piediri. Tiam la maljunulo levas lin per siaj brakoj kaj portas lin kiel lacan infanon hejmen al la domo. La filo ridetas, li metas siajn brakojn ĉirkaŭ la kolo de Resen, ĝemas kaj mortas ĉe la koro de sia patro.

La maljuna Rese fariĝis monaĥo, kaj li fariĝis la biendomon de Gudom monaĥejo.

Trad. Asta Mikkelsen.

## *Hotel-Adresaro.*

Odense, Hotel Ansgar.

---

### **Biskvitoj** kaj **Mielkukoj**

Bona biskvito, mastraĵa biskvito, sekala biskvito kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de  
**F. Holle,**  
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas senpage (se la provizo sufiĉas) paketon kun unu el la tri artikoloj.

### **Ilustrita** **Gvidlibro** **pri Vejle**

havebla ĉe

*Eldonejo Esperantista*  
Strandgade 11,  
Kopenhago.

==== Prezo: 35 Øre ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

---

## KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

---

**Bastonoj kaj Ombreloj**  
- - - je ĉiuj prezoj - - -

---

*Telefon 8610.*

*Telefon 8610.*

## Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

**Bredgade 35, København.**  
(Kopenhago)

**Bela poŝa ŝtampilo** (la emblem-  
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

**Ŝtampilo:** (la verda stelo). Nur:  
35 Øre (25 sd.).

**Kuseno:** 35 Øre (25 sd.).


### :: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,  
poŝtkartoj, silkflagetoj, propagand-  
iloj, k. t. p.

## C.M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-  
aĵo de konataj  
danaj artistoj en  
plejgranda elekto.

**Ŝirmfornoj**

tre elegante  
nikelumitaj.

**Kuirfornoj**, kaj iz-  
ole starantaj kaj

por enmurigo kiel ankaŭ  
por hoteloj. Ĉiu speco de  
fandaĵkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej  
bona fabrikaĵo.**



## AMATOROJ!

Aĉetu viajn  
fotografajn bezonaĵojn ĉe

**MIMOSA**  
**Kopenhago,**  
**Vimmelskaftet 43.**



Redakcio kaj Administracio: **Strandgade 11, Kopenhago.**  
Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.